


ĝis revido



ĈIPAGĜE | EL LA TUROJ DE LA KATEDRALO DE NOTRE DAME, LA BELA RIVERO SENA BELEGAS EN PARIZO

M >24

MOVENTON!



Vojaĝo al Esperanto-lando per:
PASPORTA SERVO!

#07 AŬTUNO2005

Brazilas Esperantistaj Junulara Organizo BEJO

MOMENTON!

#07 AŬTUNO 2005



Brazilo estas lando kun kontinentaj proporcioj. Depende de kie oni loĝas, transiri ĝiajn landlimojn kaj trovi homojn, kiu ne parolas la portugalan denaske, estas por multaj, aventuro kiuj des pli iĝas malfacila, por brazilanaj esperantistoj kiuj deziras uzi la lingvon kiam ĝi fariĝas vere necesa. Malhelpas tiun celon la fakto ke en aliaj sudamerikaj landoj esperantistoj malabundas kaj ke iliaj lingvoj ne tiom malsimilas al la portugala, ebligante tiel interkomprenon, kun ioma peno.

Tial, bona oportuno aperas kiam eblas al brazilanoj vojaĝi la "malnova kontinento" por tie, inter la pluraj landoj kaj sies lingvoj, praktikadi kaj ĝui Esperanton for de la hejmlando.

Tion faris nia ĉi-numera kontribuanto Mateus Firmino, kies raporto rakontas pri sia pasportserva vojaĝo en Eŭropo kaj pri la fama jarfina renkontiĝo IS (Internacia Seminario) en Wetzlar, Germanio.

Alia grava evento okazis kelkaj tagoj post IS. Reen al Brazilo, "Momenton" fokusas sur Monda Socia Forumo - 2005. Pli kaj pli amase kaj esperantistaro agadas ĉe gxi. Rigardu tion, kio okazis kaj tion, kio mankas okazigi laŭ la analizo de Rodrigo de Méo.

Ni konsilas al vi legi la duan parton de la Interreta artikolo, kiu pritraktas komunikadon, sed ankaŭ ni invitas vin fuĝi de la hejmsideco, kaj akompani nin en la aventuro, kiun "Momenton" partoprenis kun la teamo pri ekstremaj sportoj de "Vertikala".

Kiel vi povas konstati, nia revuo tiel plenas pro la kontribuoj de niaj amikoj. Do, ekverku kaj helpu daŭre plenigi niajn "Momentojn"!

Rogener Pavinski Aprilo/2004

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO.

REDAKTADO kaj **ARTO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.

ARTO kaj **PRILABORADO** | Roger Borges, Madrid.

SUPERRIGARDO | Ísis Okabe Piton, Campinas.

REVIZIADO | James R. Piton, Campinas.

DISTRIBUADO | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).

Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP

bejoesperanto@yahoo.com.br

www.esperanto.org.br/bejo

INTERRETO KAJ ESPERANTO >>> 2.0 KOMUNIKADO



ni sekvu nun al la dua subtemo: interkomunikado. Ĝi okazblas inter du aŭ pluraj personoj. Kaj ĝia rapideco povas esti tuja aŭ prokrasta, preskaŭ sendepende de la distanco. Mi skribos iom pri senpagaj servoj, kiuj faciligas la komunikadon per Interreto.

La elektronika poŝto estas klasata tiel, kiel prokrasta, ĉar la mesaĝoj senditaj povas prokrasti eĉ kelkaj minutoj antaŭ alveni al la alia korespondanto (ve, tia longtempa!:-). Por rajti uzi retposton, unue vi devas elekti kaj aliĝi al iu el la nenombreblaj tiaj servoj. La plej konataj en Brazilo estas:

Yahoo - <http://mail.yahoo.com.br>
Ubbi - <http://mail.ubbi.com.br>
BOL - <http://www.bol.uol.com.br>
IG - <http://webmail.ig.com.br>
Hotmail - <http://www.hotmail.com>

Vi ankaŭ povas havi esperantan e-poŝton ĉe: <http://esperanto.zzn.com>

Por trovi korespondantojn en Esperantio, ekzistas kelkaj retpaĝaroj, kiuj enhavas retpoŝtadresaron. Vi povas serĉi tie korespondantojn laŭ samintereso, regiono, ktp. Tiuj servoj ankaŭ ebligas, ke vi inkluzivigu tie montrante viajn proprajn informojn. Tri ekzemploj pri tiaj retpaĝaroj estas:

Esperanta Korespondanta Servo - <http://members.aol.com/enrike/ekseo.htm>
Retkartaro - <http://www.esperanto.nu/kartaro>
Edukado Korespondanta Servo - <http://www.edukado.net/korespondado.jsp>

Se vi preferas interŝanĝi viajn ideojn tute publike kaj diskuti, vi nepre uzu la dissendolistojn. Vi aliĝu al grupoj laŭ temoj kategorie organizitaj. Tiel vi povos sendi mesaĝojn al la grupo unufoje kaj ili atingos ĉiujn kunlistanojn. Reciproke, mesaĝoj sendita de iu alia grupano ĉiam alvenos en via retpoŝtujo. Por la brazilanaj esperantistoj, la plej famaj grupoj estas:

esperanto-br - <http://br.groups.yahoo.com/group/esperanto-br>
EKi - <http://br.groups.yahoo.com/group/eki>
VEKi - <http://groups.yahoo.com/group/veki>
BEJO-listo - <http://br.groups.yahoo.com/group/bejo-listo/>

Krom la retpoŝto, ankaŭ ekzistas la babilaj retpaĝaroj (babilejoj) kaj la tujmesaĝiloj. Ambaŭ ebligas tre rapidan transigon de mesaĝetoj: nur kelkaj sekundoj sufiĉas por tio.

Uzante la babilejojn, homoj devas antaŭe interkonsenti pri kiam samtempe eniri en iu retpaĝaro aŭ oni povas libervole babilu kun personoj hazarde trovitaj iam tie. La babilado estas farita inter ĉiuj, kiuj volas partopreni. Do tiaj retejoj ja funkcias tre interaktive kaj iomete mikse. La plej konata estas tiu, en la jena retpaĝo:

Gangalo - <http://gxangalo.com/babilejo>

La tujmesaĝiloj pli taŭgas por havi privatajn duopajn konversaciojn. Ili postulas, ke ambaŭ babilantoj uzu specifajn programojn. Poste elekti kaj instalu vian preferatan tujmesaĝan programeton, vi devas registriĝi kiel uzanto. Do vi rajtos serĉi personojn, kiuj ankaŭ estas registritaj por la sama tujmesaĝilo. Krome, vi povos interkonsenti kun viaj amikoj por sekurigi unu al la alia kiel ofta kontaktanto. La tujmesaĝiloj pli uzataj de la Interreta "homamaso" estas:

MSN - <http://messenger.msn.com.br>
ICQ - <http://www.icq.com>
AIM - <http://www.aol.com.br/aim>

Tamen la plej fleksebla mesaĝila servo, kvankam ne multe konata, estas: **Jabero (Jabber)** - <http://www.jabber.org>

Tiu ĉi lasta ekzemplo estas pli diskomunikema ol la aliaj. Ekzemple, la uzantoj de MSN ne povas interkontakti la uzantojn de ICQ, kaj samreciproke. Sed tiuj, kiuj uzas Jaberon, kapablas kontakti kaj jaberanojn kaj MSN-anojn kaj ICQ-anojn kaj aliajn. Jabero ankaŭ ebligas uzi retpaĝarojn por kunsidigi multajn diskutantojn. Por scii pli pri Jabero, vi legu la jenan artikolon en: http://www.liberafolio.org/Interreto/jabero_kaj_esperanto

La lasta novaĵo (ne tiom nova) pri tujmesaĝo estas la plibonigo de ilia voĉsenda kapableco. Du jenaj ekzemploj montras tion.

"Paltalk" apartenas la lastan generacion de tujmesaĝiloj, kiuj ebligas mezgrandan kunvenon en retpaĝaro, kie ĉiu povas

enviciĝi por siafoje paroli uzante propran mikrofonon, aŭdi la aliajn per laŭparolilo aŭ simple uzi la klavaron samkiel en la ordinara babilejoj. Tiu ĉi sistemo estas tre bona por praktiki paroladon en Esperanto. Vi vizitu la suban retejon por scii pli:

Paltalk - <http://www.paltalk.com>
Esperantaj klarigoj - <http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br>

Skajpo (Skype) estas interreta telefono. Alivorte, uzante ĝin vi povas paroli kun iu ajn el ie ajn kaj, pli interese, samkoste: vi nur devas pagi la elektron de via komputilo kaj la interretan uzadon. La sonkvalito estas eĉ pli bona ol tiu, de la ordinara telefono. Ĝis kvin homoj povas interparoli samtempe kvazaŭ ili estus en la sama loko. Kaj ekzistas versioj en pluraj lingvoj. Vi sciu pli en la retpaĝo:

Skype - <http://www.skype.com/home.pt.html>

Resume pri komunikado per interreto, oni povas klasigi tri grandajn rimedojn. Jen:

- Retpoŝto estas la plej malrapida pero. Spite, ĝi oportunitigas pli ricajn, korektajn kaj ĝustajn interŝanĝojn de ideoj, ĉar oni havas pli da tempo por kontroli siajn mesaĝojn antaŭ sendi ĝin. Krome, estas pli facile korespondi kun homoj de alia flanko de la Tero, ĉar retpoŝto ne postulas samtempan konektiĝon al la interretaj periloj.

- Tujmesaĝiloj estas multe pli vigla kaj, kompreneble, tuja. Tamen ili precipe taŭgas por amuze babilu kun amikoj kaj hazarde trovi novajn amikojn.

- Retpaĝaroj aldonas grupajn karakterojn al la rimedoj de la tujmesaĝiloj. Homoj povas kunveni kaj samtempe diskuti iun ajn komunan aferon, eble el tre malproksimaj lokoj.



25a BEJK >>>

BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO

La 25a BEJK okazos en Porto Alegre, de la 19a ĝis la 23a de Julio-2005.

Samtempe kaj samloke, realiĝos la 40a Brazila Kongreso de Esperanto.

Se vi neniam venis al Porto Alegre, nek dum la Monda Socia Forumo, nek dum alia okazintaĵo, jen bonega oportuno koni tiun belan urbon.

La temo de la BKE estas Tutmondiĝo kaj Frateco, kiu tre rilatas al nia lingvo.

La programo de BEJK ankoraŭ ne estas kompleta, kaj vi povas sugesti ion al la kunordiganto pri eventoj de BEJO, Mateo Firmino:

<mateo_eo@yahoo.com.br> aŭ al LKK-ano Marcelo Stoduto, <mstoduto@terra.com.br>

La kongresejo jam estas difinita, kaj ĉio marŝas por ke bonega kongreso okazu, kun ekskursoj, ludoj ktp.

Pliajn informojn vi trovos en la ret-paĝo de la kongreso: <http://www.lujz.org/bke/> kie baldaŭ vi povos legi la duan cirkuleron, la programon ktp.

Ne forgesu ke BEJO-anoj ĝuas grandan rabaton por la aliĝo. Se vi ankoraŭ ne estas BEJO-membro, fariĝu tuj kaj ne maltrafu la oportunon iri al Porto Alegre.



En la kvina jaro de mia kurso de Medicino, oni rajtas fari staĝon ekster la Fakultato kaj eĉ eksterlande. Tio dependas de la rilatoj, kiujn niaj profesoroj havas kun aliaj profesoroj de tiuj eksteraj lokoj. Kaj estas profesoro, kiu havas tiajn kontaktojn kun hispana profesoro en Madrido. Ĉiujare, tiel, iras grupo de studentoj por fari tri-semajnan staĝon en Madrido, Hispanujo. Kelkaj gekolegoj kaj mi decidis iri. Ili proponis resti pli da tempo en Eŭropo, konsiderante la multekostecon de la aviadil-bileto. Kaj konsiderante miajn fincajn kondiĉojn, mi akceptis tian multekostegan, sed mirindan ideon, ĉar mi estas esperantisto...

La interrilatoj

Fakte, mi konfesas, ke tiam mi ne estis bona korespondanto, kaj mi havis malmultajn interrilatojn kun eŭropanoj. Tial, mi uzis la libron "Pasporta Servo", por kontroli la eblojn, ke iuj povu gastigi min dum la periodo, kiun mi restos en Eŭropo. Fine, per retadreso, telefonalkvokoj, kaj per la granda helpo de tre bonaj geamikoj, mi sukcesis la tutan esperantistan gastigon en Eŭropo, kaj mi restis tie, dum du monatoj, sen pagi iom ajn pro hoteloj, junulargastejoj, k.s.

EN HISPANUJO (DE LA 13A DE NOVEMBRO ĜIS LA 04A DE NOVEMBRO)

EN HISPANUJO (DE LA 13A DE NOVEMBRO ĜIS LA 04A DE NOVEMBRO)

La Unuaj Tagoj:

Fakte, la unua tago, la tago de la alveno (la 14a de Novembro), estis unu el plej densaj. Ni alvenis al la Flughaveno “Barajas” (Barahas) je la 11a30, matene. Mi estis tute laca, pro la aviadil-vojaĝo. Telefoninte al S-ro. Pancorbo, mia unua gastiganto, ni reinterkonsentis pri la vojoj atingi lian domon.

Ĝi troviĝas en “Galapagar, la Navata”, iom malproksime de Madrido. Do, eke, mi devis enmetroiĝi, kaj elmetroiĝi, enrajniĝi, kaj elrajniĝi, por, fine, marŝi kaj atingi lian ĉarman domon. Imagu: mi, granda kamparulo kiu estis uzinta metroojn nur kelkfoje, en San Paŭlo, kaj iom eĉ timis, devis tuj lerni uzi ne nur metroojn, sed trajnojn, kiuj eĉ ne bone ekzistas en nia lando.

Tamen, mi alvenis en ordo. S-ro. Pancorbo kaj lia edzino “S-ino. Coral”, tre afable ricevis min. Ne imagebla estas la ĝentileco

“MI, GRANDA KAPARULO, DEVIS LERNI UZI TRAJNON”

de tiu ĉarmega, gastigema, amuza, kaj feliĉa geparo, dum unu semajno en Hispanujo! Je la unua tago, dimanĉe, ili vizitigis al mi la belan Monaĥejon, en “El Escorial”, nordokcidente de Madrido.

En la unua tago mem, ankoraŭ dimanĉe, mi telefonis al la junulo Marco Trevisán, unu el la plej mildaj kaj amikemaj personoj, kiujn mi ektrovis. Lin mi ekkonis pere de la reto, antaŭ longe, kaj lia ankaŭ tre amika fianĉino, “Suru”, disponigis sian domon por mi dum la du aliaj semajnoj.

Miaj rapidaj ekskursoj

Krom staĝi, mi ankaŭ ekskursis. La multaj vizitindaĵoj de la centro Madrido estas tre gapindaj. Kiaj belaj estas la eŭropaj aŭtunaj foliaroj! Kiaj belaj estas kaj la antikvegaj, kaj la modernegaj konstruaĵoj!

Kiam estis tempo, mi vizitis ankaŭ malproksimajn lokojn. Toledo, Segovujo, El Escorial (denove) estas nepriskribblaj. Aparte interesaj estis miaj semajn-finaj ekskursoj: unue al Lisbono, Portugalujo, kaj due al Granado, en la sudon de Hispanujo.

Lisbono estas ja tre rava urbo. En la malnova parto troviĝas preskaŭ po unu preĝejo en ĉiu stratangulo. En Betelehemo, estas grandega Monaĥejo (Sankta Jeronimo), krom la fama turo. Kaj en “Vasco da Gama”, staras tre granda komplekso de modernaj vizitindaj konstruaĵoj.

En ĉiuj ekskursaj lokoj, mi trovis eksterlandulojn de ĉiuj partoj de la mondo. Klare kaj skandale stariĝis la lingvaj problemoj por interrilatoj. Ne pensu vi, karaj legantoj, kaj la angla solvis la problemojn. Tute ne! Komprenable, mi tiam revadis pri ĉia uzo de Esperanto en tiaj situacioj...

Nu, je la 4a de Decembro, sabate, mi aŭdis ĉiujn hispanojn kaj la tutan Hispanujon. Mi enbusiĝis al Francujo, Parizo. Interese, ke kun miaj francaj gastigantoj mi finis la decidojn ankoraŭ en Hispanujo, pere de la reto.



EN FRACUJO (DE LA 5A DE DECEMBRO ĜIS LA 14A DE DECEMBRO)

La gastigoj kaj la homoj

Kiam mi alvenis al stacidomo de Parizo, Ann jam stare estis atendanta min. Ŝi estas tre milda kaj afabla junulino. Eble, ŝi estas la plej afabla inter ĉiuj. Ŝia kunulo, Franck, ricevis min en ilia apartamento, kiu troviĝas en “Gambeta”, tre ĉarma kvartalo de Parizo, kiel ĉiuj anguloj de Parizo. Fakte, Franck estas la pasportservano, sed ambaŭ estas, denove, tre afina esperantista geparo. Ili ja helpis min ĉiasence.

Poste, mi restis kun Jérôme Mathieu, alia tre ĝentila gastiganto de Parizo. En lian apartamenton iris Eduardo, urugvajano, kiun multaj brazilanoj konas. Tiu amuza esperantisto estas la reprezentanto de Unesko en sia lando, kaj li restis en Parizo ĝuste pro laboraj kialoj. Ni kune promenis en Parizo, kaj longe babilis pri la Internacia Seminario, kien ambaŭ iros.

Krom ilin, mi konis la E-istancon de Parizo, kaj mi babilis kun tre interesaj personoj. Ankaŭ la fervojistojn mi vizitis, okaze de ilia Zamenhofa festo. Tre amuzaj kaj gajaj ili ja estas.

La katastrofo

Nu, mi aĉetis la aviadil-biletojn al Italujo, pere de la reto, kun la helpo de Zebastjan Kirf, mia gastiganto de Germanujo ĉar li havis kreditkarton. Tre frue matene, sub la frostiga vetero, mi enbusiĝis de Parizo al Bauvais, de kie la aviadilo deterigiĝus. Ĉio ruliĝis tre bone: mi prenis mian bileton, mi enviciĝis. Multaj italoj, kun ilia ĉarma lingvo, kaj mi atendadis la momenton. Subite, de laŭtparoliloj estiĝis akra voĉo en la franca kaj en la angla, kaj ĝi diris, ke la flugo estis malokazigita pro malbonaj veteraj kondiĉoj. Terure! Multaj ĉirkaŭ mi kriis. Aliaj ploris. Kelkaj eĉ vomis! Kion mi farus? Iri trajne al Italujo estus tre multekoste kaj la tempomanko ne indigus. Do, denove mi uzis mian esperantistecon...

La solvo

Mi rapide telefonis al mia frata amiko Zebastjan Kirf, de Emden. Kun li mi multe babilis per Interreto, antaŭ foriri el Brazilo. Rakontinte ĉion, li akceptis min iri al lia urbo!

Do, mi revenis al Parizo. Mi telefonis al mia amiko s-ro. Renato, de Italujo. Estis granda feliĉo al mi babilo kun li. Ni tre bedaŭris, ke mi ne povis iri al Italujo.

Fine, mi sukcesis replani ĉion, kaj mi iris rekte en Germanujon, la ĉiopova lando, kie loĝas Zebastjan, la ĉiopova junulo.

EN GERMANUJO, ANTAŬ LA INTERNACIA SEMINARIO (DE LA 15A DE DECEMBRO ĜIS LA 26A DE DECEMBRO)

Per buso mi atingis Bremen.

De tie, trajne, mi iris al Emden (mi iris Emdennnn, jam gramatike ĝusta vorto). Emden estas tre bela kaj agrabla urbo. La pejzaĝo, estiĝanta trans la fenestro de la trajno, renovigis mian animon. La ĉielo rebluiĝis! La aero refreŝiĝis! Ĉio venis ĝustetempe!

Emden estas tre malgranda kaj ĉarmega urbo de Germanujo. Ĝi estas tre organizita, tre pura, kiel ĉiuj urboj de Germanujo, mi pensas. Mi promenis kun Zebastjan, per la biciklo pruntita de li, tra multajn lokojn. Ĝi ŝajnas urbetoj de Brazilo, krom pri la organizo, kompreneble. Sub la malvarma, sed ĉiam agrabla vetero, mi biciklis multfoje, ĉiam akompanante Zebastjan-n (denove gramatike ĝuste).

Kun li, mi iris multfoje ankaŭ al lia „fak-alt-lernejo“, laŭ lia klarigo. Tie, mi pasigis la plejmulton de la tempo, mi konis multajn interesajn personojn, kaj mi eĉ partoprenis en liaj klasoj de Esperanto.

MALDEKSTRE | DUM KRISTNASKO
DEKSTRE | LA IS-URBO WETZLAR

En la tago de mia alveno, la 15an, ni festis la kreinton de Esperanto (aŭ la “iniciatoron” laŭ la propra Z.).

Dum la Kristnasko

Mia kristnasko okazis ĉe la afabla familio de Zebastjan, en Bielefeldo. Alveninte tien, je la 24a de Decembro, ni estis varme bonvenigitaj de la gepatroj de Zebastjan, per bela afiŝo “Ĝoja Kristnasko, Sebastian kaj amiko”. Sekve, ni promenis en la infanaĝan urbon de Zebastjan. La etoso estis mirinda. Ni revenis al lia domo, la tuta familio vespermanĝis.



Mi fariĝis ano de la familio. La donacoj ĉe la abio estis disdonataj tre ĝojige. La tiama etoso estis tute rava!

En la posta tago, ni ankoraŭ vizitis kelkajn amindajn parencojn. Vespere, ni trajne vojaĝis al lia avino, kiu loĝas en Fulna, alia tre ĉarma germana urbo. Tie, mi konis alian grandan parton de la familio de Zebastjan. La infanoj tre interesiĝis pri Esperanto, kaj mi Cseh-metode instruis al ili.

Fine, je la 27a de Decembro, ni forvojaĝis al Wetzlar, malgranda urbo de “Hessen” (Hesujo), kie okazis la **48A INTERNACIA SEMINARIO!**

BONVENON, DOKTORO! >>> ANATOMIO DE UNU SEMINARIO



Post interesa vojaĝo per la jam konataj trajnoj de Germanujo, de Fulna al Wetzlar, je la 15:30, Zebastjan kaj mi finfine alvenis en Wetzlar (Veclar), en la ĉarman IS-urbon. Nin ricevis germana geparo, kiu kunveturigis nin al la IS-ejo. Ĝi estis en la Junular-gastejo de la urbo, kiu troviĝas sur mezalta monto, iom for la urbocentro.

Alveninte en la Seminariejon, mi tuj kontribuis al la loka radio, per telefona intervjuo. Poste, mi aliĝis, kaj mi pagis nur tri eŭrojn. La rabaton mi gajnis pro miaj programkontribuoj (tri prelegoj) kaj la frua elsendo de ties resumoj. Post la aliĝo, mi akompanis Zebastjan kaj novajn geamikojn iri al la urbocentro, por aĉeti manĝaĵojn por la semajno. Ni revenis kontraŭleĝe, t.e., sesope en malgranda tipa germana “Wolkswagen”.

La Junular-gastejo konsistis el du domoj: la propra Seminariejo, kie okazis la internaj programeroj, kaj kie la “feliĉuloj” (laŭ la difino de mia franca amiko, Mihaelo) komforte gastis kaj manĝis; kaj apude, estis

La “Memzorgantejo”, kiu, planita laŭ nazia epoko, gastigis la “malfeliĉulojn”, laŭ la sama difininto Mihaelo. Kompreneble, mi devintus resti en la Memzorgantejo. Tamen, jam en la alvena vespero estis tioma la homamaso, ke mi devis translokiĝi al alia ĉambro samgranda, samkomforta, samtrankvila, ene de la Seminariejo. Tiel, miaj noktoj estis sufiĉe bruaj, pro la kantoj el la trinkejo, pro la apudaj ambrakumoj, beboj, kaj ĉe ratoj, kiuj dormis kun ni. Jes, kara leganto! Oni portis eĉ raton, mi ankoraŭ ne scias kial...

En la Seminariejo, krom la diversaj dormoĉambroj de la “feliĉuloj”, estis multaj klasĉambroj, kie okazis la samtempaj prelegoj kaj laborstudoj. En la teretaĝo, estis multaj amuziloj (tabla futbalo, ekzemple), kaj la trinkejo, kie ĉio estas permesata... Estis ankaŭ la manĝejo de la “feliĉuloj” (la manĝoj estis inkluzivigitaj en la aliĝ-kosto, por ili), kie oni faris la silvestran bufedon. Oni ne forgesu la Diskejon, uzita por la Arta Programo kaj, vespere, por dancado, ĉefe... LA BAMBO!



La brazila blindulo...

...gvidata de europanoj

EN MARBURG, LA EKSURSA URBO DE LA IS, ONI PROPONIS LUNDON BLINDIGI HOMON

KAJ KONDUKTI ILN LAŬ DANCEJAKAJ LONGA VIJO. MATEO ESTIS UNU DE LA ELEKTITAJ.

Fine, menciinda estas la tipa ĉambro de la eŭropaj junulaj renkontiĝoj, la Gufujo. Tiu malhela ejo estis la sola trankvila kaj senbrua loko por babili, trinki iun ajn teon, ludkartumi, ktp.

La geamiko

Nu, ĉiuj scias, ke Esperanto estas la plej bona amik-kreito de la mondo. Tamen, mi neniam povus antaŭkompreni la IS-on! De ĉie, venis mirindaj homoj, nepriskribeblaj esperantistoj, kun kiuj mi rapide interkonatiĝis kaj amikiĝis. Neimageble estas, ke ili venis de baltaj, slavaj, latinaj, ĝermanaj landoj, krom de Ruslando, Urugvajo, Kanado, kaj Usono. Nenombreblaj estas iliaj lingvoj. Tamen, ĉiuj pasigis amike kaj frate unu tutan semajnon kaj bonege intrekomprenis per Esperanto!

Inter aliaj, menciindaj estas Aneta, de Pollando, la princino de Esperantujo; Mikael, Baptisto, Christophe, Sebastien, Cyrille, kaj aliaj pluraj gefrancoj; Leena, la kanadanino; Maria Lourdes, kaj José, de Hispanujo; Bertrand, la gravulo de TEJO; Andi, de Hungarujo; Bianca, de Rumanujo; Luciano kaj Gabrielle, de Italujo; kaj, komprenble, la abundaj tre amikaj germanoj.

Inter ĉiuj, mi plej multebabilis kun Marek Blahus, mia ĉefa 18-jara amiko. Ĉar li kaj mi estis la solaj partoprenantoj de niaj landoj, ni tre bonege amikiĝis. Kun mi, li promenadis en la ĉarma urbo Wetzlar, krom la ekskursiva urbo "Marburg". Dume, al mi li rakontis la historion de la lingvoj en Eŭropo, kaj mi la kuriozaĵojn de Brazilo. Li ja estas tre genia, kaj brila junulo! Kiel multaj, li deziregas koni Brazilon, kaj tre verŝajne li venos por la BKE-2006, okazonta en Campinas.

La neĝo

MALDEKSTRE | LA NEĜO FALADAS DUM LA ELIRO AL MARBURG
DEKSTRE | KUIREJO DE LA MALFELICULOJ, EN LA MEMZORGANTEJO

Unuafoje mi vidis la neĝon en Wetzlar. Mi estis prezentanta mian unuan programkontribuon, en tre varme komforta ĉambro, kiam tra la fenestroj mi vidis ion falantan el la ĉielo... Tiam, mi subite ĉesis paroli, kaj neniuj spektanto komprenis. "Ĉu tio estas ne-ne-ĝo?", mi demandis tre scivole kaj feliĉege. Ili ekridegis kaj respondis "Ne". Tio ankoraŭ estis la antaŭneĝo. Tre emocie mi finis mian prelegon, kaj mi kuris eksteren. Pacience mi akompanis la "antaŭneĝon" plidensigi. Kia bela estas la neĝado! Neforgesebla estas la senso ricevi glacieron sur la haŭto. Tiu blankaĵo kovris la herbaĵojn, la tegmentojn, la arbojn, kaj ĉion ekstere. Tre bela estas la neĝo!



Okazis kelkaj ekskursoj dum la IS. La unua, estis en Wetzlar, kiam mi lernis miajn unuajn klasojn kiel ludi per la neĝo. Tamen, la plej longa (tuttaga) ekskurso estis en Marburg, proksima urbo. Tie, la vetero estis sufiĉe nebula kaj frostiga. Ni faris ludon: per tuko, kelkaj homoj devis momente blindiĝi por esti gvidataj de geamikoj. Kompreneble, mi estis unu el elektitaj esti blindulo. Aneta, kun kiu mi jam estis babilinta, kaj Marek, kun kiu mi estis multe babilonta, gvidis min. Pro tiu ludo, mi frate geamikiĝis kun tiuj intereseĝaj homoj. Kaj, feliĉe, mi ne falis eĉ unu fojon. En la sama tuta ekskurso, ni vizitis du muzeon. Oni anoncis, ke la muzeo temas pri Etnologio. Fakte, tre mirinde ni malkovris, ke ĝi temas ĝuste pri la brazila kulturo! La ekspozicio montris aferojn de Umbanda, priskribojn de Amazonio kaj de indiĝenaj triboj. Mi tre volonte klarigis al ili kelkajn terminojn ne tradukitajn, kiel "petro velho", "pai de santo", ktp.

Poste, al la dua muzeo ni iris. Tiu ĉi nun temis pri Anatomio. Do, denove, mi tre ĝoje kontribuis, ĉar mi studegis kelkajn teknikajn terminojn por miaj prelegoj. Hehe, tiel mi fariĝis sufiĉe utila en la ekskurso de Marburg.

La Programeroj

Kiel menciite, ĉiam okazis dekoj da programeroj samtempe. Sekve, ne eblis al ni spekti ĉiujn. Kvankam mi partoprenis tre amuzajn kaj kuriozajn kontribuojn, pro miaj propraj prezentoj, mi nepre maltrafis kelkajn bonegajn programerojn.

Ekzistis du tipoj de programoj, la Tema Programo, kaj la Distra Programo. La programeroj de la unua ĉiam celis pri la la temo de ĉi tiu IS, t.e., "Kulturaj Diversoj problemoj kaj perspektivoj". La Distra temis pri ĉio ajn. Ekzemple, por gajni la grandan aliĝo-rabaton, mi prelegis tri-foje en la Distra programo.

Fakte, dum la tuta tago estis pluraj samtempaj partoprenindaĵoj, kaj ankaŭ dum la nokto (postnoktomeze) okazis intereseĝaj nemaltrafindaj programeroj. Post la Arta programo vespere, je la noktomezo kaj duono, ĉiam estis la "Universitata Programo", kiam oni prelegis pri "kiel staĝi kaj loĝi en fremda lando". Poste, je la 1a kaj 30, oni pasigis la tre amuzajn filmojn kun subtekstoj en Esperanto. Do, pro la programeroj, oni ofte dormis post la 4a, se, kompreneble, oni ne deziris babili kun la geamiko plu.

Brazilo en la Internacia Seminario

Mi kaptis laŭ mia pasportserva vojaĝo, ke Brazilo, bedaŭrinde, ne estas sufiĉe bone konata. Tiuj, kiuj pli bone ĝin konas, estas ĝuste la esperantistoj, pro la fakto, ke en Brazilo estas la plej granda esperantistaro de la mondo. Se eĉ tiel, multaj de IS tute ne konis ion ajn pri Brazilo, kaj oni ofte petis de mi diri kelkajn vortojn en la hispana, ĉar oni ofte pensis, ke nia nacia lingvo estas la hispana. Cetere, eĉ nian e-kulturon (verkojn, artaĵojn, k.a.) malmultaj konis pro preskaŭ kompleta nescio.

Tamen, laŭŝajne, ĉi-IS-e la afero malsamis. Certe ne pro mi, afabla leganto. Mi ja kontribuis kaj disvastigis la bonan bildon de Brazilo. Fakte mi estis la sola kontribuanto pri “sciencaj” temoj, kaj tio tre plaĉis al ili. Ankaŭ la brazilaj ludkartoj (“truko”, “kulero”, k.t.p.) en la noktaj

de la Teatro Trupo de Tuluzo. Aparte ĝuige estis la neplanita koridora koncerto de la kanadino Leena kaj ŝia violono. Pli kaj pli aldoniĝis homoj por akompani ŝiajn talentojn, hehe.

La Novjariĝa Festo

Sendube, la plej speciala momento de la tuta IS estis la Novjariĝa Festo, ĝia ĉefa motivo.

Dum la vendreda posttagmezo, oni ornamis la manĝejon por la famega “Silvestra Bufedo”. Jam vespere, okazis la tradicia Danca Konkurado. Sekve, ekestis la tiom atendata kaj dezirata Bufedo. Tiu festeno estis tre abunda! De longa tempo mi ne estis manĝinta tiom “laŭvole” kaj abunde. Tre bone manĝinte, jen komenciĝis la Novjariĝa Festo. Pli kaj pli la amika etoso fariĝis mirinda. Je la 22a festiĝis la Novjariĝo de la rusoj kaj aliaj... Je la 23a, oni faris la feston

de la aliaj... Je la Noktomezo de Germanujo, la plejmulto festis la

“NI VIZITIS MUZEON PRI... LA BRAZILA KULTURO!”

gufujumoj tre plaĉis al ili. Aliflanke, tamen, Aneta Ubik, Laŭtika, kaj Zebastjan Kirf disvastigis tre belan bildon de Brazilo, kaj mi klare memoras, ke iliaj programoj estis tre abunde vizitita de multaj seriozaj scivolemuloj.

Tial, post ĉio, mi ankoraŭ opinias, ke la brazilanaro povintus kaj certe povas multe kontribui al E-movado kaj malkaŝi siajn potencojn.

La Koncertoj kaj la Artaj Prezentoj

De la rokaj al la klasikaj, la muzikoj en la noktaj koncertoj en la Diskejo estis la plej diversaj kaj buntaj. Esperanto Desperado, “La Rolls”, “Eric Languillat”, kaj aliaj brilegis tiam. Tre aŭskultinda estis la novjara klasika koncerto de la partoprenantoj. Inter aliaj, okazis la tre atkvalita teatro “Familia Etoso”, prezentita

Novan Jaron per belaj kaj efekta j artfajraĵoj. Unu horo poste, oni retrokalkulis la Novjariĝon de la angloj kaj la portugaloj. Fine, je la 3a frumatene, ĉiuj kune festis la Novjaron de Urugvajo kaj de Brazilo! Neforgeseblaj estis la amikecaj kaj fratecaj brakumoj de miaj novaj tutmondaj geamikoj! Kompreneble, inter la festadoj, ni dancadis ĉiujn ekzistantajn versiojn de La Bambo, ĝis la nokto-nokto-fin’...

La adiaŭo

Dimanĉe matene, en la 2a de Januaro, mi akompanis Martin al Den Haag, Nederlando, kie li gastigis min. La geamikojn mi adiaŭis tre kortuŝe, iom suferere, sed ankaŭ esperante novan iaman revidon

MALDEKSTRE | LA MIRINDA BUFEDO: ĈIUJ MANĜU POR LA NOVA JARO

EN NEDERLANDO (DE LA 2A DE JANUARO ĜIS LA 10A DE JANUARO)

De la Internacia Seminario, mi iris kun Martin al Nederlando. Ni faris kvinhoran vojaĝon de Wetzlar al lia urbo, Den Haag, per lia eta, sed tre bona aŭtomobilo.

En Frislando, Delft, k.a., mi ekkonis la tipajn nederlandajn konstruaĵojn kaj preĝejojn. Kaj, kompreneble, menciindaj estas la lignaj ŝuoj, la digoj, kaj la grandaj kaj pluraj ventmuelejoj.

Internacia Esperanto-Instituto kaj Universala Esperanto Asocio

Nemaltrafeblaj estas la Esperantistaj instancoj en Nederlando. Mi vizitis unue la Internacian Esperanto-Instituton, en Den Haag. La domo, kiu apartenis al mia granda admirato Andreo Cseh, estis tiam rekonstruata. Eĉ tiel, Atilio Rojas, kiu ĉiam helpis min, akceptis min kaj mi gastis ĉe li. Krom multe babili kun li, kaj helpi lin pri la rekonstruo, mi dormis sur tre fama lito, kie multaj famuloj dormis.

Ankaŭ al Rotterdamo mi iris, trajne. Tie troviĝas la tre fama „Centro Officejo” de la Universala Esperanto Asocio. Dum unu tago mi babiladis kun tre interesaj homoj, mi konis multajn fakojn de UEA, kaj, kompreneble, mi aĉetumis en la Libro-Servo de UEA.

En Amsterdamo

Fine, mi iris al Amsterdamo, la libera urbo! Malmulte mi promenis en Amsterdamo, fakte. Post koni la ĉefajn vizitindaĵojn de la urbocentro, mi iris al la flughaveno por enaviadiliĝi al Britujo.

En Britujo

Nu, la vojaĝo al Britujo estis sufiĉe trankvila. Fakte, en la fino de mia aventuro,

mi jam estis tre laca, sed kun multaj ideoj bolantaj en mia cerbo, por ilin apliki en Brazilo.

En Redhill, proksima urbo de Londono, mi restis kun esperantista brazilano. Li nomiĝas Luiz Grasso. Lia ekstrema ĝentileco kaj amuzeco sentigis al mi la brazilan etoson denove! Tiel, ke mi ne plu deziris koni Londonon, kion mi faris dum nur unu tago. Luiz Grasso kaj mi multege babilis pri gravaj aŭ amuzaj aferoj de la vivo, kaj ni tre bone amikiĝis.

Fine, mi revenis al Brazilo, mia tre amata lando, post longa, interesa, kaj laciga sperto per Pasporta Servo.

Finaj Konkludoj kaj Dankojn

- 1- Pasporta Servo, interreto kaj Esperanto JA funkcias!
- 2- La germanoj ne estas tiom kruelaj kaj minacaj, kiel oni diras... Fakte, ili estas tre bonkoraj kaj amikaj.
- 3- Oni konas nur unu tipon de banano, en Eŭropo!
- 4- La Paca Palaco, en Den Haag, ne estas vizitinda loko.
- 5- Mi kore dankas al ĉiuj miaj gastigintoj, kaj mi speciale dankas al ĉiuj helpintoj, nome Zebastjan Kirf, Neusa P. Mendes (MiMa), Atilio Rojas, Renato Corsetti, kaj Elsa Rossi. Sen ili, mi eble estus arestita en Eŭropo...
- 6- Korajn bondezirojn al Marek, Aneta, Bertrand, kaj Mikael, kies historioj ŝanĝis mian pensmanieron pri la utilo de Esperanto.



PORTO ALEGRE > MSF 2005

Daniel Haddad, el Curitiba, kantas: "...alia mondo, alia vivo..." dum la Monda Socia Forumo



FORMIGA > BH 2005

Karen estas la kuraĝulino, kiu nenion timas (krom araneoj...)



WETZLAR > IS 2004

Mikaelo, el Francio, jam pretas por la silvestra balo...



MONDA SOCIA FORUMO >>> ĈU ALIA MONDO EBLAS?

Mi vojaĝis al la gaŭĉa ĉefurbo danke al instiga programo de la fakultato, en kiu mi studas. Tial mi preferis kaj bezonis dediĉi plej grandan parton de mia tempo al aktivecoj, en kiuj nia studentaro povos pli profiti, konsekvence, plurfoje mi ne povis partopreni en la organizado de la esperantistaj aktivecoj. Ekzemple, la giganta marŝado, kiu ekigis la forumon, kiel mi atestis pere de la lokaj raportaĵoj, alvokis atenton kaj sukcesis verdigi kaj demokratiigi tiun okazaĵon plenplena je ĉiaj homoj kaj grupoj.

Unu el miaj unuaj decidoj estis viziti la budon de Brazila Esperanto-Ligo,

“AŬ NIA MOVADO ADOPTAS NOVAN CEDEMAN SINTENON AŬ ĜI ANTAŬDESTINITAS DAŬRIGI KIEL KOMUNA ŜATOKUPO” nia amata lingvo disde la socia vivo de la modernaj civitanoj

kie mi trovis tre entuziasman grupon de reprezentantoj de la Internacia Lingvo. Tie troviĝis abunda materialaro kaj ĝia lokiĝo kontribuis por ke granda nombro de vizitantoj konaktiĝu kun nia propono kaj kulturo.

Laŭ la pasado de la semajno dum mi pli kaj pli enamiĝintis la urbon kaj ĝia popolo mi ankaŭ spertis la gentilecon orfertita de la samideano Gert Bolten Maizonave, kiu tuje prizorgis miajn bezonojn, laŭ peto pere de Interretaj diskutlistoj.

Unu tagon antaŭ ol reveni, mi vekiĝis pli frue kaj iris al ega tendo, sub kiu la esperantistoj realigis interesan debaton pri la uso de Esperanton kaj ankaŭ kurson por la

komencantoj, kiu havis intereson kaj involviĝon de la publiko. Tie mi finfine renkontis kun amikoj el BEJO, kun kiuj mi plezuri pasigis la tagon. Reveninte al la budo de BEL, inter aliaj same ŝatataj kamaradoj, ni trovis la faman profesoron Paulo Ereno, kiu sprite kaj elegante, konvinkis min ke Esperanto ankoraŭ havas grandajn ŝancojn sukcesi kalkulante je homoj kiel li mem.

Skribi pri la la pasinta somero en Porto Alegre sen paroli pri sekso, drogoj kaj rokmuziko estas preskaŭ neebla tasko ĉi tie, tamen mi tion klopodas fari respekte al la bonaj esperantistaj kutimoj, kiuj pro troigo kaj hermetika sinteno nur apartigas ĉiam pli

Ĉi tiu estis la unua konkludo al kiu ĉi tiu vojaĝo permesis al mi alveni: Aŭ nia movado adoptas novan pragmatisman kaj cedeman sintenon aŭ ĝi antaŭdestinitas daŭrigi kiel ŝatokupo komuna nur al kelkaj junuloj, multe pli revantaj ol vere engaĝitaj kaj interesataj pri la mondo, en kiu ni vivas.

Reveninte al San-Paŭlo, inter la ĉifitaj pakaĵoj mi portis defion: Alogigi kaj palbebligi Esperanton por junaj studentoj sen tamen malproksimigi la plurajn kolegojn, kiuj spite al la ideologio tro konservativa kaj provincana adoptida, daŭrigas la movadon vivan kaj foje aktivan.





AVENTURO

Multaj homoj kiuj vivas en plenplenaj modernaj urboj, streĉite pro la kaosa vivo, ege sopiras al ferioj inter la natur-pejzaĵoj, kie eblas inspiri puran renovigitan aeron.

Vertikala estas nomo de la grupo, kiun Joe kaj Karen, el Formiga- MG gvidas. Ili praktikas sportojn en la naturo, kiel grimpado, vizito al kavernoj, akvofaloj, padoj, ktp

MOMENTON IRIS AL FORMIGA POR AVENTURI

Ni komencis la avnturon per 30-kilometran vojaĝo per biciklo. Ni transiris montojn kaj deklivojn, tra suno kaj pluvo kaj post 3 horojn, ni, tute elĉerpitaj atingis la destinton. Indas mencii la biciklan-heroon Louis, por kiu, tiu vojaĝo estis simpla varmigo por la morgaŭa oficiala kuro (kiun li venkis). Meze de la vojo, la biciklo de Karen fuŝis, kaj li, de sur lia biciklo ankoraŭ puŝis ŝin, eĉ dum supreniroj!!

La vizitoj al kavernoj estis la plej interesa por mi. De komence la vespertoj iom timigas, sed poste oni alkutimiĝas al ilia flugado ĉirkaŭ nin. Kelkaj truoj estas tiom etaj, ke oni elspezas longajn minutojn nur por trairi al aliaj lokoj de la kavernoj.

Malsupreniri per "rapelo" postulas multan zorgon de la gvidantoj. Pro la sekureco trankviliga de Joe kaj Karen, mi unuafoje praktikante ĝin, ne timis.

La plej ekstrema aventuro de la vojaĝo estis la vizito al malproksima akvofalo. 50 km sur alfato, plus 25km sur tero kaj 5 km sur monto!! Mia motorciklo tute ne taŭgas por tero, tial mi multe suferis, ankaŭ sur monte. Oni devas sekvi piede dum ĉirkaŭ duon-horo, tra rivero kaj pado, por atingi la akvofalon, sed tio ne estas la fino, ĉar la kulmino estas droniĝi en la basconon (tre malvarma) kiu estiĝas supre, antaŭ la akvofalo! Mirinde!

AVENTURIS | ROGENER PAVINSKI

